

Ĉu si estis Esperantistino, fervorulino, propagandistino
 Jes, ŝi estis kvankam ŝia agado ne povis esti grandskala.
 Kelkaj el niaj plej malnovaj samideanoj memoros ŝin, ĉar ŝi
 ja estis jam tre malnova Esperantistino, tiel malnova kiel
 mi mem, tio estas de Oktobro 1906-a. Mi loĝis en Antverpeno,
 ŝi en Lieĝo. Mi faris varman reklamon pri mia nova
 studo, kaj kiam mi vizitis ŝin je Kristnasko, ŝi faris al mi la
 surprizon alparoli min en Esperanto. Ŝi estis sekvinta kur-
 son, sen mia scio, kurson kiu precize je la sama epoko estis
 farita en Lieĝo. Kaj de tiu tempo ŝi ĉiam restis aliĝinta al
 nia movado kaj propagandis kiel ŝi povis. Kie estas ankoraŭ
 niaj tre malnovaj serideanoj kiuj vidis ŝin kun mi ĉe la unua
 Belga Kongreso en Verviers, en 1909? Kiu memoras ŝian ĉe-
 eston ĉe ambaŭ kongresoj en Lieĝo, en 1921 kaj 1930? Kaj
 en Antverpeno ĉe la mondkongreso en 1928 kaj ĉe la nacia
 en 1932? Kiu memoras ankoraŭ ion pri ŝia personeco, pri ŝia
 neegalebla afableco, agrableco, vivĝojo kaj beleco? Kaj kiu
 scias aŭ memoras ke ŝi estis mia tutviva koramikino, kiu
 partoprenis ĉion, kun kiu mi travivis ĉion, reale aŭ letere,
 kiu skribis ankoraŭ al mi de tagojn antaŭ ŝia malsaniĝo, la
 29-an de la lasta decembro, kaj al kiu mi skribis ankoraŭ
 kiam ŝi jam estis mortinta?

Ha, tiu virino kvazaŭ senmorta, ĉiam gajaspekta kaj juna,
 havis tamen siajn ĉagrenojn, siajn dolorojn, kiuj inside for-
 mortigis ŝin. Malsana filino, malsana nepineto, por kiuj ŝi ĝis
 la lasta kapablo oferis sin. Kun siaj karaĵ malsanulinoj ĉir-
 kaŭ si, ŝi devis stavele enlitiĝi. Ŝiaj fortoj estis elderpitaj:
 post dusemajna malsano ŝi forlasis nin por eterne.

Mi nenion scias pri la malsaniĝo, la telegramo venis kiel
 tondrobato. Mi sukcesis alveni en Fléron je la vera mo-
 mento kiam oni elkondukis por ĉiam la plej grandun trezoron
 de mia vivo. Ŝia nomo? Lucy, ma Luke, S-ino Generaledzino
 Mozin.